# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

6a jarkolekto, n-ro 8
novembro 1986

ATENTINDAĴOJ

°°°
xxx
°°°

Germain PIRLOT pretas organizi, aldone al la ekzistanta Gazetara servo, R E B A T - S E R V O N kaj serĉas por tio personojn kiuj pretas kunlabori.
Tial, ĉiuj tiuj kiuj volas esti utilaj en tio estas invitataj al S T U D O - L A B O R - tago je sabato 6-a de decembro 1986 ekde 14.00 en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, ANTWERPEN

------

Kasistoj atentu

Por ke via membroj profitu de la rabato pro frua kotiz-pago, zorgu ke la aliĝiloj alvenu en la Centro antaŭ 31 12 1986

--------

Planita kadrokurso-serio, partoprenebla de ĉiu kiu havas sufiĉan lingvokonon

| datoj | horoj | temoj | gvidantoj |
|---|---|---|---|
| 29 11 1986 | | studotago por instruantoj | |
| | 10.00-12.00 | lingvaj / gramatikaj demandoj | Chr. De Clerck |
| | 14.00-17.00 | praktikaj demandoj (metodiko/didaktiko) | Emiel Van Damme |
| 06 12 1986 | 14.00-17.00 | studo/labortago de GAZETARA SERVO | Germain Pirlot |
| 13 12 1986 | 14.00-17.00 | studo-tago por kasistoj/sekretarioj | la administra kernestraro |
| 24 01 1987 | 10.00-17.00 | Parolteknikoj (publika parolado) | Paul Peeraerts |
| 28 03 1986 | 10.00-17.00 | Kunventeknikoj | Paul Peeraerts |
| 23 05 1987 | 10.00-17.00 | Interhomaj rilatoj (Transakcia Analizo) | Ivo Durwael |

Ejo : Esperantodomo, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.

E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Meidoorn 42/2, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN
Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
GAZETARA SERVO Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14 33
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN 011/32 36 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN



P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 15-a de novembro 1986 en Antverpeno.

Ĉeestis : Ivo DURWAEL (ID), Paul PEERAERTS (PP), Roland ROTSAERT (RR)
Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (IV) kaj Jan BOVENDEERD (JB)

Petis senkulpigon : Erik D'HONDT (malsana) kaj Edward SYMOENS (eksterlande)

Prezidas : ID

Protokolas : JB

Komenca horo : 08.45 h

1. La protokolo pri la antaŭa estrarkunsido estas aprobita.

2. FINANCOJ

2.1. Ĝenerale : okazis grandaj investoj, precipe en nia libroservo.
Tio kompreneble postulas same grandajn vendojn.
Konsiderante tion, la situacio estas sana.

2.2. Libroborso Antverpena
La libroborso okazis de 31 10 ĝis 11 11 1986 en "Bouwcentrum" en Antwerpen. La eldonejo " 't Spectrum " disponigis en sia granda stando malgrandan lokon por Esperanto. Troviĝis en la bretaro, krom la Prisma-vortaro ankaŭ nia memstudo-paketo, konsistanta el 1) la kurso-libro ESPERANTO PROGRAMITA, nova eldono, 2) kasedo 3) vortaro (Prisma) vendata por BF. 1495,-
La atento de la publiko estis konsiderinda, la vendo tamen preskaŭ nula, dum la postaj reagoj nombris t men kelkajn dekojn.

2.3. Gazetara konferenco
ID okupiĝos pri la preparo de gazetara konferenco, kies dato tamen ankoraŭ ne fiksiĝis.
Antaŭ la okazigo PP proponas ŝanĝi aŭ prefere adapti la ĉe-fasadan tabulon pri la Esperantodomo al la nova stilo.
Aliflanke, RR proponas reorganizi la domon mem, metonte la studo-ĉambron ekz. tien. kie troviĝas nun la direktora oficejo kaj tiun ĉi aliloke.
Aprobite. Nur la realigo dependas de la disponeblaj laborfortoj.

2.4. Kunlaboro kun ECN (Esperanto-centro Nederland)
Por eviti samtempan kaj samspecan, do, duoblajn laborojn, JB proponas denove kontaktiĝi kun ECN, kiel jam okazis antaŭe.
ID proponas inviti ilin al nia venonta estrarkunsido kaj, se tio ne eblos, fiksi daton je kiu ni povus iri al Den Haag.

JB telefonos al S-ro Burg de LCN (00-31-70-55 66 77) por aranĝi eblan renkontiĝon.

2.5. Institucio Hodler.

Envenis letero de S-ro Victor Sadler, komisiita de UEA por trovi eblan solvon al la problemo.

Antaŭe S-ro G. Maertens estis farinta proponon en kiu li subtenas nian proponon.

PP respondos al S-ro Sadler.

2.6. Vojaĝoj

K. Tytgat faros unuan informilon, kiu estos dissendita kune kun INFORMILO kiel speciala numero.

3. <u>INFORMADO - GAZETARA SERVO</u>

3.1. Je 06 12 1986 okazos studo/labortago, gvidata de Germain PIRLOT kun la celo organizi REBAT-servon aldone al la jam ekzistanta Gazetara Servo.

Serĉataj estas personoj, kiuj pretas eltondi artikolojn aŭ/kaj reagi al ili sendante leterojn al la gazetaj redakciejoj.

Ankaŭ ne-esperantistoj povas kunlabori.

3.2. Radio-elsendoj

Laŭ informoj ricevitaj de Louis Janssens, kunlaboranto de BRT, okazis jam kelkaj elsendoj kadre de la lernejaj programoj.

BRT 3 pretas elsendi serieton da Esperanto programeroj kaj proponas programigi ĉiu-tagan 2-minutan Esperantokurson kadre de la mondaj elsendoj (Werelduitzendingen).

Tiuj-ĉi programoj do estas iniciatitaj de BRT mem sen speciala peto nia. Jen ege favora situacio !

Ankaŭ en la personara gazeto de BRT aperas regule Esperanto-novaĵoj.

3.3. Jubilea tago

Laŭ la sama persono, la plej bela kaj plej reala propono de BRT estas, ke la BRT - TV mem faru programon por ni.

3.3. Patrona komitato

La leteroj por eminentuloj estas nun preparataj kaj dissendotaj.

3.4. ES proponis aboni "ONDERWIJS-WEGWIJZER" verketo pri ĉio kio koncernas la instradon en Flandrio.

Post diskuto decidiĝas ne abnoni ĝin, ĉar la prezo ne estas en rilato kun la por ni interesaj informoj.

3.5. InterRail

Ni klopodas, pere de Nederlandano (Bob Venhuizen) akiri ekzempleron



de le nederlanda broŝuro InterRail. Ŝajnas ke en ĝi, kie ankaŭ en la germana, aperas anonco de PASPORTA SERVO. Se tio veras, ni klopodos enirigi tiun anoncon ankaŭ en la belgan fervojan broŝuron.

3.6. La Nederlanda Kongreso 1987 okazos je 3-4-5/4/87 en Amersvoort

4. <u>BEF - ĉefdelegito</u>

Okaze de la ĝenerala jarkunsido de BEF je 08 11 1986 en Bruselo, kiun diversaj FEL-anoj partoprenis, elektiĝis kiel nova ĉefdelegito por Belgio : Georges SOSSOIS, 2, rue de la Consolation, 6400 COUVIN, telefono 060/34 55 66.

Nia kandidatino, Georgette Wybouw, do, ne estis elektita, kvankam de la prezidanto varme dankata pro ŝia preteco kandidatiĝi.

Normale - aŭ prefere, plej ofte - la ĉefdelegito plenumas ankaŭ la taskon de <u>peranto</u>. Pro kialoj jam eksplikitaj kaj plie, pro la fakto ke FEL (GCA) jam faras la kompletan membroadministradon por Belgio, proponiĝis ke FEL daŭre funkciu kiel peranto. Tio tamen ne senplie akceptiĝis, kvankam la propono ricevis sufiĉe grandan subtenon.

Finfine, la afero restas nesolvita ĝis posta decido post nova prikonsidero.

5. <u>DIVERSAĴOJ</u>

JB raportas ke li renkontis personon, kiu asertis ke li povas helpi rilate al elsendoj de lokaj radiostacioj. Tiu proponis ekzemple prepari regulan Esperanto-kurson por dissendo je samtagaj, samhoraj elsendoj. JB sin demandas ĉu io tia ne estus farebla surbaze de la kasedo de ESPERANTO PROGRAMITA.

Kvankam la ideo estas interesa, ŝajnas ke ni mem ne povas realigi ĝin, ĉar por prepari tian kasedon, ni bezonus teknikan aparataron kiun ni ne posedas.

Afero tamen prikosiderenda.

Fina horo : 11.45 h.

JB

LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL VIII

## P S I K O L O G I A J   L U D O J

MEMORIGO : POR BONE KOMPRENI LA TEKSTON, MI RIPETAS KE G,P,I ESTAS MALLINGIGOJ POR GEPATRA, PLENKRESKULA, INFANA. MI SKRIBAS ILIN KUN MAJUSKLO ĈAR TEMAS PRI LA 3 EROJ REKONEBLAJ EN LA MENSO DE ĈIU INDIVIDUO : G RILATAS AL TRADICIO, P AL NIA JUĜOKAPABLO KAJ I AL NIA SPONTANECO.

A. - "Mi tiom bedaŭras ke mi ne povas paroli kun eksterlandanoj kiam mi vojaĝas dum la ferioj, ĉar mi tre pene lernas fremdajn lingvojn. Mi envias viajn Esperanto-spertojn."

B. - "Kial vi ne eklernas Esperanton, la ..."

A. - "Jes, sed tio estas malfacila por mi."

B. - "Oh ne, ĉar ... "

A. - "Jes,sed mi ne konas Esperantistojn. Kiel mi povus trovi ilin ?"

B. - " Ho, vi povus konsulti ... "

A. - "Jes,sed eble mia edzo ne ŝatas ke mi sekvos vesperkursojn."

B. - "Ĉu vi jam parolis kun li pri tio ?"

A. - "Ne, sed krome mi pensas ke mi ne eltenos regule sekvi kurson."

Ĉi tie montriĝas klare, ke S-ino A ne volas esti konvinkita per B. La signifo de tiu ĉi ludo, kiun ni nomu "Jes, sed ...", estas kvazaŭ : "Vi povas argumenti tiom, kiom vi volas, sed vi ne sukcesos ŝanĝi miajn ideon, ĉar mi superas vin."

Tiu konkludo donas momentan malpezigon al persono, kiu sentas sin malkontenta pri si mem. Ĝi estas sento, kiu tre ofte naskiĝis jam en la infanaĝo pro ordonoj kaj devigoj de la gepatroj, kiujn oni devis efektiigi kontraŭvole kaj ne bone digestis.

Ekzistas ja amasego da psikologiaj ludoj. Eric Berne skribis tutan libron, kun la priskribo de tiaj ludoj, nome "Games people play". En la nederlanda ĝi nomiĝas : "Mens, erger je niet." Sed ĉiuj tiuj ludoj havas kelkajn komunajn trajtojn.

- Tiu, kiu ludas , ofte ripetas la saman ludon, laŭ la sama baza skemo.
- La ludanto uzas ŝajne raciajn Plenkreskulajn argumentojn, sed malantaŭ tio troviĝas kaŝita intenco.
- La celo estas plifortigo de negativa opinio, kiun oni konservas el la infanaĝo. (Ekz. ĉi tie : Miaj gepatroj ĉiam premis min por fari, kion mi ne volis fari)



- La fina rezulto estas sento de malakcepto de si mem aŭ de la aliaj (ĉi tie : Amiko, mi tamen rezistas al via premo, ĉar mi superas vin" sed ĝi ankaŭ povas esti : "Mi estas senvalora, ĉiam malsukcesinta, malbonŝanculo..") Kun iom da atento, vi malkovros ĉiutage tiajn ludojn en ĉiuj societaj renkontiĝoj : ĉe festoj, en akceptoj, dum kartludo, dum balo, en trinkejoj ĉe la bufedo ktp. Dum psikologiaj ludoj manifestiĝas plej multaj antaŭjuĝoj. Gravega por ni estas, ke raciaj argumentoj ne trarompas antaŭjuĝojn, sed ofte provokas nur aliajn antaŭjuĝojn. (Jes, sed ...) Tial estas interesega por ekkoni kelkajn rimedojn por trarompi psikologian ludon.

Ĉu vi memoras, ke en antaŭaj artikoloj mi bildigis konversacion per sagoj ? La skemo de psikologia ludo konsistas el serio da sagoj. Unuavide P ⟶ P (interŝanĝo de informoj), sed la kaŝintenco de la ludanto estas I ⟶ G. Ebleco por haltigi la ludon estas provo por aktivigi la P de la ludanto per starigo de demandoj. Revenante al la antaŭa konversacio oni povus diri ekz. : "Kion vi scias pri Esperanto ? " "Ĉu vi jam aŭdis aŭ legis ĝin ?" "Ĉu vi havas ideon, kie oni povas trovi Esperantistojn ?" "Ĉu vi iam sekvis vesperkurson ?" ktp.

Alia maniero, precipe kiam oni ludas plurope, estas simple rektigi la torson, alrigardi la parolantojn kaj diri nenion. La efiko estas surpriza, eĉ komika, ĉar sufiĉe rapide la konversacio stagnos per ia rimarko kiel : "Kion vi havas Ivo, vi ŝajne ne samopinias, ĉu ne ?" aŭ "Kaj vi, kial vi ne diras ion ? "

Kaj tiam kelkaj trafaj demandoj povas komplete renversi la ludan etoson kaj ŝanceligi la antaŭjuĝojn pri la priaprolata temo.

Ivo Durwael.

# Flandra Esperanto-Ligo

vlaamse esperantobond V.Z.W

esperanto
internationale taal

AKTIVECRAPORTO

al BEF pri la jaro 1985/86

Normale ke la ĝenerala agado direktiĝis al la jubilea jaro.

Speciala atento iris al la renovigo de la aspekto de nia movado cele al digna reprezentiĝo de la Esperanta societo kaj al atentokapta alfrontiĝo de la estonto.

Tiucele ekestis speciala laborgrupo pri instruado, informado kaj al tio ligitaj aliaj -adoj. Tiu komisiono, kunlabore kun FEL-estraro, priekzamenis la diversajn eblojn kaj ellaboris planon el kiu jam realiĝis kelkaj.

Ekzemple, post kontaktiĝo kun diversaj profesiaj reklamagentejoj, estas decidita - kaj jam efektivigita - nova FEL-stilo por ĉiuj niaj publikajoj, kiel leterpapero, kovertoj, broŝuroj, kursolibroj k.s. Alivorte, ĉio kion ni ekde antaŭnelonge produktas, aperos laŭ la sama bildo, kun la sama emblemo, laŭ la sama prezento.

La grupoj aliĝintaj al FEL estas insistepetataj uzi la saman stilon kaj, por tion ebligi, FEL faras specialan oferton per liverado je ekster-konkurencaj kondiĉoj de la necesa materialo.

Diversaj broŝuroj jam aperis en tiu nova vesto.

Rilate al la ĝenerala agado, FEL ankaŭ lanĉis konkurson intergrupan por pliaĥtigi la membronombron. Ĝis nun la membraro kreskis je 11 %. Pri la fina rezultato neestas eble raporti jam nun.

FEL ankaŭ proponis al siaj grupoj organizi specialan jubile-programon. Kelkaj jam akceptis, kvankam plej multe el ili preferus unutagan, amasan kaj kiel eble plej internacian festprogramon, ekzemple proksime de la Zamenhoftago. Do, ĉirkaŭ la 15-a de decembro. Rilate al tio, ni petis publikigon de artikolo en Heroldo de Esperanto kaj en ESPERANTO de UEA, dum ni ankaŭ dissendis leteron al la landaj asocioj de Eŭropo.

Krome ni decidis organizi studotagon por instruantoj kaj kadrokursojn pri Parolteknikoj (Publikaj - ), Kunventeknikoj kaj pri Interhomaj rilatoj (Transakcia Analizo), laŭ la sama skemo kiel la kadrokursoserio kiu jam okazis en la jaroj 1981/82.



Kiel verŝajne jam sciate, FEL ankaŭ transprenis la eldonejon STAFETO kaj ties librorondon. Aperis jam unua verko, nome "Ĉu rakonti novele" de Johán Valano, sekvota de verko de Waringhien kaj poste verŝajne de nova romano de Deck Dorval.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke la delonge atendata vortaro Esperanto-Nederlanda-Esperanto (Prisma-) finfine aperis kaj disvendiĝas ankaŭ en la ĝeneralaj librovendejoj.

" 't Spectrum" ankaŭ promesis - kaj jam faris - lanĉi en la librovendejojn nian mem-studo-kurson ESPERANTO PROGRAMITA.

Ekspozicioj okazis en GB/INNO/ BM en Antverpeno okaze de ĝia 100-jara ekzisto. Tio okazis de 03 - 19/10/1985. Aliaj okazis en Antverpeno (Naturborso), Genk, Hasselt, Tongeren, Gent k.a. Je tiuj okazoj la ekspoziciantoj povis uzi la novan ekspozicimaterialon de FEL.

Rilate al turismo, P.J. van Duijne el Middelburg ellaboris planon por kampadantoj/kampademuloj kaj diskonigis tion kunlabore kun FEL kaj pere de ties novaĵbulteno.

Nia Turisma Servo, kiu kunlaboras kun tre grava entrepreno (VTB/VAB) ankaŭ organizas ĉiuspecajn vojaĝojn kaj feri-eblecojn. Por la jubilea jaro, tiu sama servo preparos grupvojaĝon al la jubilea UK en Varsovio.

Rilate al kongresoj, FEL ne organizos kongreson en 1987 por ne konkurenci aliajn, nun Nederlandon. Ni jes proponis al ĉi lasta estonte organizi kongreson <u>alterne</u> ĉiun duan jaron. Ni tamen ne certas ĉu la Nederlandanoj akceptis. Kiel ajn estu, ni pretas propagandi ilian pere de nia novaĵbulteno.

Serve al niaj Flandraj kongresoj, ni preparis kongresregularon.

Pli ĝenerale, ni povas ankaŭ mencii ke la Kortrijka grupo LA KONKORDO komence de ĉi jaro, festis la 60-jariĝon de sia grupo. Sekve al tiu festado ili altiris 40-on da novaj lernantoj al sia kurso.

Laŭdindan iniciaton prenis la Antverpena LA VERDA STELO organizante 4 intergrupajn programojn jare, nome je ĉiu 5-a vendredo de tiuj monatoj kiuj nombras 5 semajnfinojn.

Kaj nia Liga bulteno ESPERANTO PANORAMA aperigis sian 100-an numeron en julio ĉijare.

Por fini, ni volus proponi al BEF kaj APE, aŭ fakte al ĉiuj belgaj Esperanto-organizoj, adapti sian socian stilon, sian eksteran aspekton, do, al la nia por tiel unuformigi la bildon de Esperanto tra la tuta lando.

JB.

Hodiau nur estas deirpunkto.Ĉiuj vojoj estas liberaj kaj malfermitaj por esploro kaj pridiskutado.Kaj ĉiuj homoj rajtas pensi kion ili pensas.
Mi esperas ke mi sufiĉe klare skizis la etoson de absoluta libereco en kiu ĉi tiu laboro fariĝu rilate al esprimo de personaj ideoj kaj opinioj.
Tio estas nepra kondiĉo por plene sukcesi !

Edward Symoens
29-08-1986

## Membrostatistiko 1985 - 1986

| Grupo | en 1985 | en 1986 | |
|---|---|---|---|
| Aalst | 41 | 43 | 2 |
| Brussel | 22 | 35 | 13 |
| Blankenberge | 7 | 5 | 2- |
| Brugge (Reĝa) | 26 | 11 | 15- |
| Leuven | 55 | 60 | 5 |
| Kalmthout | 32 | 38 | 5 |
| Gent | 19 | 36 | 17 |
| Kortrijk | 32 | 39 | 7 |
| Limburg | 47 | 47 | 0 |
| Antwerpen | 139 | 140 | 1 |
| Mechelen | 7 | 17 | 10 |
| Mortsel | 22 | 20 | 2- |
| Brugge (PJ) | 35 | 41 | 6 |
| Sint-Niklaas | 3 | 3 | 0 |
| Wilrijk | 3 | 3 | 0 |
| FEL | 97 | 121 | |
| Entute: | 593 | 656 | |